

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Januari 1947

35 årg. Nr 1

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

Sufiĉas la parolo. Komenciĝu la periodo de agado!

Esperanto ekzistas jam de post konsiderinde longa tempo — 60 jarojn. Ĝenerale periodo tiom longa sufiĉas por transpasi la pioniran staton. Sed, ĉu la esperanta movado eluzis la "infanĝuojn"? Kiu respondu kaj kion? Ni devas memori, ke estas grava diferenco inter ideoj, kiuj formis popolajn movadojn sur diversaj kampoj. Ni menciui la abstinencan movadon, la diversajn societojn kristanismajn, la laboristan movadon k. t. p. Ili ĉiuj postulis kaj ankoraŭ postulas de siaj membroj kaj subtenantoj oferojn, idealisman sindonon kaj certan aktivecon. Sed ... tamen neniu el tiuj movadoj postulis de siaj membroj lerni lingvon. Tion postulas la esperantista movado; sekve ni postulas pli da intelekta aktiveco, pli da fortostreĉo de la individuo ol iu ajn societo menciita. Bedaŭrinde restas ankaŭ inter la medioj esperantistaj tro multaj, kies grado da aktiveco estas diskutibla. Sed plejparte la adeptoj de la lingvo kaj popolmovado Esperanto vere oferas kaj tempon kaj monon kiam ili samtempe faras nedisputeblan streĉon intelektan.

Kial ni jam ne venkis? Estas malfacila tasko rapide respondi je tiu demando. Lasu al mi tamen atentigi la legantojn-esperantistojn pri kelkaj faktaj. Unue estas tiel, ke Esperanto estas prezentata sur kampo *kultura*. Oni ne forgesu, ke grandaj kulturaj kaj spiritalaj movadoj devis batali jarcentojn, eĉ jarmilojn sen rezulto granda. Se mi mencias la kristanisman, kiu eĉ uzis glavojn, terurajn militojn kaj enkarceran torturon, mi komprenigas mian opinion tre klare. Ni, adeptoj de la zamenhofa idealo, ĝis nun uzis modestajn, pacajn kaj trankvilajn rimedojn — tute konforme al nia ideo. Esperanto, kiel aliaj vere kulturaj movadoj, devas kalkuli je relative malrapida progreso.

Se oni pensas je ideoj kaj inventoj, uzataj por celoj teknikaj kaj ekonomiaj, ekzemple la fervojo, aviado, radio k.a., ni komprenas facile ilian rapidan marŝadon antaŭen: oni povas investi monon kaj post certa tempo ricevi pli da mono. La

kontraŭstaro en la komenco ĉiam estas sufiĉe rapide venkata, kiam kapitalaj interesoj trovas eblecojn kontentigi sin. Sed por la afero mondlingva neniu ĝis nun povis "riski" unu milionon por siatempempe — eĉ tre baldaŭ — ricevi du milionojn. Jen la granda diferenco inter ideoj kulturaj kaj pure materialismaj. La profito kapitala ĝis nun ne povis trovi eblecon okupi sin pri esperanto. Ĉu mi tuj aldonu: feliĉe ke ne? Jes, respondu iu alia.

Tamen la esperantistoj tutmondaj ne estas kontentaj. Absolute ne! Ni scias, ke nia lingvo estas grava instrumento kaj kultura kaj teknika, kiun la homaro devus uzi por akcelado de la universala paco, de la moderna tekniko kaj entute por plifeliĉigo de la surteraj estaĵoj. Ni deziras arde, ke la regantoj de la mondo ordonu al lernejoj aŭtoritatoj en ĉiuj landoj enkonduki Esperanton. Tiam ni post deko da jaroj havus jam novan generacion, kiu posedus Esperanton kiel sian duan lingvon je dispono por ĉiuj celoj penseblaj. Eĉ por malbonaj celoj Esperanto estus uzibla, sed ĝia "interna ideo" jam certgrade garantias uzadon por celoj noblaj kaj demokratie dezirindaj. Do, ni konkludu: Esperanto en la lernejon estas hodiaŭ la plej grava postulo. Ĝi estas eble la sola vojo, kiu kondukas al rapida venko de nia ideo, ĝis nun portata tra la mondo de idealistoj sinoferantaj. Nun ni demandu: Kiam la kulturaj materialistoj, t. e. la estroj de la edukado kaj instruado, faros sian devon?

Kara leganto! Eble mi lacigas vin, eĉ tedas vin. Sed mi devas aldoni ankoraŭ kelke da vortoj. Mi tuŝis ĉi-supre la devon de la edukistoj kaj instruistoj. Ĉu ni faris ĉion eblan kaj saĝe faris tion por atentigi ilin pri tiu grava devo, kiu laŭ nia opinio apartenas al ili? Kiel ajn estu tiurilate, sed ni tamen konstatas, ke nun estas tempo agi laŭ pli praktikaj indikoj ol ĝis nun. Temas do pri la disvastigo de la lingvo mem kaj la kono pri ĝi. Unuvorte: propagando. En nia tempo estas necese montri al praktikaj rezultoj, kiujn konas jam la esperantistoj aktivaj, sed kiujn la ekstera publiko

La Espero, Januaro 1947.

1887—1947

Esperanto do nun povas festi sian 60-jaran jubileon.

La pasinta periodo de Esperanto estis vere enhavoriĉa. Kelkfoje rapida evoluo, aliffoje stagnado. Estas tamen tute nature, de idea movado, kiu siaspece estas revolucia, devas travivi multon. Oni ne povas atendi, ke la homoj ĝenerale tuj akceptu radikalajn ŝanĝproponojn. Nur malrapide ili venkas.

Multaj eksteraj cirkonstancoj — antaŭ ĉio la du mondmilitoj — malfavoris la trankvilan evoluon de nia lingvo. Sed malgraŭ ĉio Esperanto disvastiĝis kaj disvastiĝas. Kaj hodiaŭ ni povas pli firme ol iam antaŭe rigardi la estontecon.

La homaro havas malantaŭ si la plej teruran militon. La paco venis al la terglobo, sed la vundoj de la milito ankoraŭ tute ne estas cikatriitaj. Multaj popoloj vivas en ekstrema mizero. Kaj tamen la esperantomovado ĉie ekfloris — jam! Oni reprenas la laboron, kie oni ĉesis antaŭ preskaŭ jardeko. Kaj esperplenaj raportoj venas el ĉiuj landoj.

Mondkongreso en Bern.

Tial la jaro 1947 venas al ni kiel nova printempo por Esperanto. Denove la esperantistoj el la tuta mondo kolektiĝos por festi grandan internacian kongreson. Oni povas antaŭvidi, ke la kongreso en Bern estos pompa manifestacio. Kia ĝojo denove revidi la alilandajn geamikojn post tiom multjara disiĝo!

Skolta mondjamboreo.

Somere 1947 kolektiĝos en Francujo skoltoj el la tuta mondo. Por faciligi la lingvan problemon multaj el la skoltoj intencas uzi Esperanton. Por tion ebligi estas organizitaj specialaj kursoj en diversaj landoj. Kaj Sveda Esperanto-Federacio decidis je sia kosto pagi la vojaĝon al Francujo kaj la restadon dum la jamboreo por 2 svedaj esperanto-skoltoj. Al ĉiuj svedaj skoltgrupoj estas dissendita reklamfolio pri nia korespondakurso.

Racia organizo.

La jaro 1947 venas al ni renkonte kun esperplenaj perspektivoj ankaŭ el aliaj vidpunktoj. Antaŭ la milito la esperantistoj estis dividitaj en diversaj internaciaj organizaĵoj. Sed dum la milito ĉiuj lernis la valoron de kunagado, de kunfandiĝo, de la neceso cedi je persona prestiĝo por la bono de la tuto. Tial ĉiuj volonte nun kunhelpas por krei unuecon. Kunfandiĝos I.E.L. kun U.E.A.

Sed ankaŭ la diversaj organizaĵoj interne de la landoj montras la saman kunlaboremon. En multaj landoj, ekz. en Aŭstrujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo kaj Polujo la esperantistoj jam kolektiĝis sub unu sola asocio. Kaj ke la rezulto estas promesiga oni povas diveni laŭ la koncernaj landaj gazetoj. Jen skribas Aŭstria Esperanto-Revuo: "La aŭstria esperantistoj nun kolektiĝis en unu jam tre granda organizaĵo, por en komuna laboro atingi sian celon, kaj ili per ĉiuj fortoj kontraŭstaros ĉiun eventualan provon disigi la unuecan movadon pro iuj separatismaj tendencoj." En aliaj landoj, kie kunfandiĝo ne okazis, regas ĝenerale tre intima kunlaboro inter la diversaj asocioj. Unuigitaj ni venkos!

Ministroj kaj parlamentanoj.

La interna stabileco korespondas al pli bona reputacio inter la ĝenerala publiko. Oni konstatas ne nur eksterordinare multajn kursojn en la diversaj landoj, sed ankaŭ pli favoran pozicion de nia afero inter la gvidantoj de la ŝtatoj. Favoras nin ekzemple registaraj ministroj (kiel en Nederlando kaj Ĉeĥoslovakujo), kaj multaj parlamentanoj (speciale en Hungarujo). Kiel specimeno de la rekono de nia afero estu letero, kiun skribis en esperanta lingvo la ĉeĥa Ministerio por informoj al Sveda Esperanto-Federacio: "Post plensukcesa prelegvojaĝo tra Svedujo revenis hejmen komence de junio (1946) s-ro J. Vitek, kies vojaĝo al via lando estis subtenita de nia ministerio. Ni nun esprimas al via asocio la plej koran dankon pro viaj gravaj helpo kaj subteno, kiuj treege sukcesigis la tutan prelegvojaĝon. — Dezirante al via asocio kaj al la tuta sveda popolo ĉion bonan, ni salutas vin plej kore. Por la ministro: Dr Kuška."

Korespondkurso en "Brevskolan".

Sed ankaŭ por ni svedaj esperantistoj la nova jaro signifos novan periodon.

Ĝis nun nia sveda esperantomovado ĝenerale devis zorgi pri si mem. Sed en la jaro 1947 aliaj organizaĵoj prenos sur sin parton de nia laboro. La granda sveda korespondinstituto Brevskolan, fondita de la tre forta tutsveda koopera asocio, en januaro eldonos korespondkurson en Esperanto laŭ komisiono de la svedaj esperantoorganizaĵoj.

Kurso por studgvidantoj.

Ankaŭ alia organizaĵo prenis sur sin gravan taskon. A.B.F. (Laborista Kleriga Asocio, kun proks. 1 miliono da membroj) organizos mem kurson por studgvidantoj

malofte mem povas konstati. La indiferentaj kaj eĉ kontraŭaj personoj kaj aŭtoritatoj devas mem esti starataj meze inter la videblaj rezultoj. Nur tiam ili kredas nin. Estas malfacile konvinke kredigi dubantojn, se oni nur parolas pri korespondado, literaturo, radiaj elsendoj kaj kongresaj vojaĝoj.

Ni jam sufiĉe parolis pri la venko; nun estas tempo *fari* ĝin! Jen ideo, kiun mi tre volonte rekomendas al LKK en Berno, poste en Malmö, Praha k. t. p. Ekde nun devas esti invitataj al niaj universalaj kongresoj kaj aliaj aranĝoj interpopolaj la aŭtoritatoj mem. Tial necesas ĉiujare sendi invitleterojn — nacilingve skribitajn — al personoj kia la ĝenerala sekretario de Unuigitaj Nacioj kaj samtempe peti lin certigi elekton de oficiala reprezentanto flanke de UN, al la ministroj de eksterlandaj aferoj en ĉiuj landoj, al la delegitaro de UNESCO, al s-ino Roosevelt, al la gvidantaj personoj de grandaj internaciaj movadoj kaj al aliaj, kiuj havas gvidajn postenojn en diversaj rondoj gravegaj. Ili devas persone esti invitataj, ne nur unufoje sed ĉiujare, jardekon post jardeko se estas necese. Se ili nek respondas nek venas, tio estas

bedaŭrinda afero, sed tamen ... ni ne laciĝu. Por la tutmonda gazetaro ni tamen havas ĉiujare la grandan, propagande efikan ĝojon prezenti bonegan materialon pri tiuj invitoj de gravuloj. Karaj LKK de universalaj kongresoj, ĉu vi ne volus komencituj? Vian eventuale kontraŭan opinion vi povas skribe anonci al SEF, Stockholm, kiu disponigos ĝin al mi.

Fine estas necese aranĝi multajn kaj oftajn vojaĝojn eksterlanden. Dank' al ebla kunlaboro kun turismaj societoj en diversaj landoj ni povas plialtigi la eblecojn al ĉiu esperantisto fari eksterlandajn vojaĝojn. Tio signifas pli malaltajn prezojn kaj samtempan certigon pri bonaj cirkonstancoj por gastoj, kiuj vizitas kongresojn, somerajn kursojn, tendarojn, k. t. p. La esperantistoj formu popolon ne nur korespondantan sed ĉiam aktive vojaĝantan. Jes, mi scias. Grava malhelpo estas ĝuste la monstro de monaj kaj valutaj bariloj. Sed estas nia tasko venki ankaŭ ilin. Cetere mi scias, ke societoj turismaj volonte disponigos al ni siajn servojn kaj — almenaŭ en Svedujo — estas pretaj plifaciligi al ni la vojaĝeblecojn pere de favoraj prezoj. Ni do ekagu — jam nun. *Lennart Åberg.*

Dankon al s-ino Julin!

La nuna redaktorino de nia gazeto, s-ino Eva Julin, jam antaŭ multaj monatoj informis la estraron de SEF, ke ŝi pro malsano deziras rezigni de la redaktora ofico. La estraro tamen petis ŝin resti. Sed antaŭ la presado de tiu ĉi numero s-ino Julin informis, ke ŝi definitive petas pri liberigo de sia tasko post la pretigo de la decembra numero.

Sveda Esperanto-Federacio deziras en tiu ĉi momento esprimi al s-ino Julin plej koran dankon pro multjara laboro por nia gazeto. Ŝi havis la malfacilan taskon zorgi pri la gazeto tra la milita tempo, kiam pro ekonomiaj kaŭzoj la gazeto devis esti malgrandigita. Malgraŭ tio, havante je sia disono nur onon de la antaŭ spaco, ŝi sukcesis konstante teni la gazeton je alta nivelo. Konstante nia gazeto defendis sian pozicion kiel unu el la plej belaj, plej bone redaktataj Esperanto-gazetoj. Por tio ni dankas al s-ino Julin kaj al ŝia nelacigebla edzo, s-ro Teodor Julin, kiu estis ŝia ĉiama kunlaboranto. Ili ambaŭ tiel harmonie kaj intime kunlaboris, ke oni ofte ne povas diri, kion faris unu kaj kion faris la alia. Al ili ambaŭ ni prezentas la sinceran dankon de la sveda esperantistaro.

Ni estas certaj, ke la intereso al Esperanto de gesoj Julin ankaŭ estonte devigos ilin kunlabori en nia gazeto. Kaj ni esperas, ke s-ino Julin nun zorgos pri sia sano, por ke ŝi kaj ŝia edzo ankoraŭ dum multaj jaroj povu aktive partopreni en ilia amata Esperanto-movado!

E. Malmgren.

REDAKTORO EN LA MILITO.

Proksimume samtempe, kiam la milito eksplodis, ekfunkciis la unua virina redaktoro de la Espero. Por tiu entrepreno oni tiam devis havi kuraĝan kredon kaj puran optimismon. Sinjorino Julin montris sin vera bravulo. Inter la plej malfacilaj cirkonstancoj ŝi povis teni la tradician nivelon de la gazeto. Ke tio signifis grandan fortostreĉon kaj oferojn, oni ne devas multe klarigi. Al la atentinda agado de s-ino Julin ni povas danki, ke en la plej malluma tempo de la plej malica milito, nia "Espero" brilis per konstanta, trankvila lumo.

Kvankam ni legantoj de la gazeto komprenas, ke estas necese ripozi post granda kaj fervora laboro, ni devas esprimi unuavice nian bedaŭron pro ŝia ekzigito kaj — nian koran, sinceran dankon pro la bela laboro kaj sukcesa klopodo.

F. S.

en Esperanto en sia altlernejo Brunnsvik dum la tempo 8—20 junio.

Sveda Statministro.

Kaj la sveda ŝtatministro klarigis je interparolo kun la prez. kaj sekr. de la Sveda Esperanto-Instituto, ke li volonte subtenas la ideon aranĝi de la ŝtato pagitajn instruistkursojn en Esperanto, ĉar li deziras subteni ĉiujn kulturilatojn inter la popoloj.

La fluganta propagandistino.

En 1947 S.E.F. laŭ iniciato kaj kun monsubteno de ĝia KELI-sekcio intencas provi novan metodon por la propagando de Esperanto. Travojaĝos Svedujon ne eksterlanda prelegisto, sed sveda. Temas pri sinjorino Anna Alamo. En la stokholma regiono ŝi estas ĉie konata pro sia lerta kursgvidado kaj sia ensorĉa varbkapablo. Kaj inter la esperantistoj de la suferantaj landoj de Eŭropo ŝia arda bonkoreco akiris famon pro ŝia granda helpagado. Ŝajne ŝi ĉie en Eŭropo havas geamikojn, kaj ĉie ŝi akiras novajn. Ne estas mirinde, ke ni atendas multon de nia nova fluganta propagandistino, kiun ni kore bonvenigas!

*

Nun mi tuŝis kelkajn aferojn, kiuj estas menciindaj je la jarŝanĝo. Ĉio montras, ke la jaro 1947 estos nova printempo por Esperanto.

E. Malmgren.

La nova redaktoro

La estraro de Sveda Esperanto-Federacio elektis min redaktoro por la federacia gazeto. Mia intereso por la gazetara problemo en la esperantomovado apenaŭ povos esti pli granda ol ĝi estas. Kaj tiu intereso daŭris dum multaj jaroj.

Sed ne sufiĉas nur intereso. Estus bone havi ankaŭ certan kvanton da kapablo. Ni esperu, ke al tiu, al kiu Dio donis oficon, Li donos ankaŭ la kapablon ĝin prizorgi. Tamen, certe pli ol unufoje mi bezonos la indulgon de miaj legantoj.

Programon por la estonta redaktado de la gazeto mi ne povas liveri. Ŝajnas al mi, ke la plej bonas estus, se mi povus teni tiun altan kvaliton, kiun la gazeto pli frue havis. Iom da ŝanĝoj verŝajne estos, sed mi ne pretendas, ke ili signifos plibonigojn.

La antaŭa redaktoro asertis, ke ne mankos materialo por la gazeto. Mi esperas, ke mi havos la saman sperton: ke la legantoj tra la lando sendos manuskriptojn abunde. Sed... samtempe mi devas peti al la estontaj verkantoj, ke ili ne malĝoĝigu, se mi devos rifuzi aŭ mallongigi iliajn verkaĵojn.

Sinjorino Julin donis al mi multajn konsilojn kaj postlasis al mi konsiderinde grandan kvanton da materialo por la januara numero. Mi tie ĉi esprimas mian dankon al ŝi pro ŝia peno ĉiamaniere plifaciligi al mi la transprenadon de la redaktado.

Fine mi dankas al la estraro de SEF pro ĝia konfido al mi, ke mi redaktu la gazeton. Mi sentas tion honoro, kiun honoron mi volas provi respondi.

Oskar Svantesson.

ESPERANTISTISK JOURNALIST-INTERNATIONAL

Journalister från 21 land har bildat Tutmonda Esperantista Journalista Asocio — ett världsförbund av esperantokunniga journalister. Efter ett års förarbete och ett halvt års ömröstningar har de skandinaviska esperantojournalisterna fått i uppdrag att bilda centralstyrelse, vilken helt består av aktiva journalister, tillhörande respektive länders journalistorganisationer. Till ordf. har valts chefredaktör C. Hilmer Johansson, Östgöten, Linköping, sekr. red. Einar Adamson, Ny Tid, Göteborg, v. ordf. red. Rich. G. Nielsen, Langelands Tidende, Rudköping, Danmark, v. sekr. chefsredaktör Niilo Kavenius, Uusi Päivä, Turku, Finland, samt chefsredaktör Werner Ödegård, Hudiksvalls Nyheter, och filologie lic. redaktör Arnfinn Jensen, Norsk Telegrambyrå, Oslo, Norge. I representantskapet har invalts: för Kina: journalist Turkiu, Chengtu, för Argentina: forskaren och journalisten Tibor Sekelj, för Sydafrikanska Unionen: redaktör W. F. Rolt, Transvaal, för USA: redaktör Preston Davis J:r, American Education Press, Ohio, för England: dr. pol. A. Mildwulf, London, för Skottland: journalist S. M. Florence, The Aberdeen Press, för Tyskland: dr Hans Unger, chefredaktör för Swisspress, Berlin, och red. Herman Theobald, Hamburger Volkzeitung, för Schweiz: dr Arthur Bauer, utrikesredaktör i Neuer Berner Zeitung, för Belgien: journalist Robert Loecks, Boschwoorde, för Ungern: redaktör Stefano Nagy, för Irland: redaktör Lorcan O'h Uiginn, Dublin. För andra länder pågår ömröstning.

En mängd förslag om internationellt samarbete föreligger för behandling vid fackkongresser, som kommer att hållas 1947 i Bern och Aarhus i samband med världsesperantokongresserna i nämnda städer.

MEDDELANDE FRAN INSTITUTET.

Lägre examen har i höst avlagts av följande personer: Allan Hultin, Skene, Herbert M. Johansson, Skene, Liss Gunnarsson, Kinna, Arne Hultin, Skene, Alf Skogman, Viskafors, Stig Lennart Norstedt, Karlskoga, Anna Lisa Nygren, Amotfors, Solveig Eriksson, Ludvika, Bertil Eriksson, Ludvika, Betty M. Creutzer, Ludvika, Roland R. Creutzer, Ludvika, Holger Albinsson, Vimmerby, samt Margareta Hammarstrand, Vimmerby.

Institutet gratulerar.

32-a Universala Kongreso de esperanto en Bern

Provizora programo

25-a de Julio.

Kongresoficejo en la ĉefstacidomo: vizitebla 9,00—22,00.

Post via alveno en la stacidomo, ne forgesu eniri la oficejon por havigi viajn dokumentojn kaj informojn.

26-a de Julio.

Kongresoficejo en la ĉefstacidomo: vizitebla de 8,00 ĝis alveno de la lastaj trajnoj.

15,30 Kunsido de IEL kaj LKK en Hotelo Bristol.

20,15 Interkonatiĝa vespero en Kursaal.

Ni petas, ke ĉiuj kongresanoj venu tien kaj se eble en naciaj kostumoj.

27-a de Julio.

Kongresejo: Kazino, vizitebla 9,00—18,00.

9,00 Malfermo de la kongresa poŝtejo en Kazino.

10,00 Solena malfermo de la kongreso en la granda salono de Kazino.

Jenaj estos invititaj: La Svisa Registaro, la Registaro de Kanton Bern, la Konsilantaro de la komunumo Bern, la Burĝa Konsilantaro en Bern, la diplomatoj kaj la honoraj gastoj.

Programo:

1. Orgenludado.
2. Parolado de la LKK-Prezidanto.
3. Parolado de iu reprezentanto de la berna registaro.
4. Orgenludado.
5. Elekto de la kongresprezidanto kaj de la kongreskomitato.
6. Parolado de la kongresa prezidanto.
7. Parolado de la reprezentanto de la diplomataro.
8. Salutoj de la reprezentantoj de la landaj asocioj.
9. Saluto de IEL-estrarano.
10. Ĝeneralaj informoj.
11. Komuna kantado kun orgenludo: Esperanta himno.

14,00 Solena Esperanto-diservo en Münster.

20,00 Kunsido de IEL-estraro.

Posttagmeze: Komenciĝas la rondveturadoj kun montrado de Bern.

28-a de Julio.

9,00 Fakaj kunsidoj.

10,00 Unua laborkunsido de la kongreso en la granda salono.

14,30 Fakaj kunsidoj.

15,00 Kunsido de IEL-komitato.

Antaŭ- kaj posttagmeze: Rondveturadoj tra Bern.

Tuttaga ekskurso al Jaunpass.

Posttagmeze: Ekskurso al Schwarzsee.

20,30 Esperanto-teatraĵo en la granda salono de Alhambra.

29-a de Julio.

9,00 Fakaj kunsidoj.

10,00 Dua laborkunsido (granda salono).

14,00 Fakaj kunsidoj.

15,00 Kunsido de IEL-komitato.

Antaŭ- kaj posttagmeze: Rondveturadoj tra Bern.

Tuttaga ekskurso al Sustenpass.

Posttagmeze: Ekskurso al Corniche.

Posttagmeze: Ekskurso al Niesen.

20,30 Esperanto-teatraĵo en la granda salono de Alhambra.

30-a de Julio.

9,00 Fakaj kunsidoj.

10,00 Tria laborkunsido (granda salono).

Antaŭ- kaj posttagmeze: Rondveturadoj tra Bern.

Tuttaga ekskurso tra vilaĝoj kaj urbetoj.
Tuttaga ekskurso al Jungfrauĵoch, unua grupo.
Posttagmeze: Ekskurso al Chasseral.

20,30 Prelegvespero de Esperanto-verkistoj.

31-a de Julio.

9,00 Fakaj kunsidoj.

10,00 Kvara laborkunsido (granda salono).

15,00 Kunsido de IEL-komitato.

Antaŭ- kaj posttagmeze: Rondveturadoj tra Bern.

Tuttaga ekskurso al Col du Pillon.

Tuttaga ekskurso al Jungfrauĵoch, dua grupo.

Posttagmeze: Ekskurso al Trümmelbach.

20,30 Kongresbalo en Kazino.

1-a de Aŭgusto.

9,00 Fakaj kunsidoj.

Antaŭ- kaj posttagmeze: Rondveturadoj tra Bern.

Tuttaga ekskurso al Jura-Saut du Doubs.

Tuttaga ekskurso al Jungfrauĵoch, tria grupo.

Posttagmeze: Ekskurso al 3 lagoj.

20,30 Koncerto en la granda salono en Alhambra.

2-a de Aŭgusto.

9,00 Solena fermo de la kongreso.

Tutan tagon: Transalpa veturado.

Posttagmeze: Ekskurso al Emmental.

INFORMOJ PRI LA EKSKURSOJ

La Loka Kongresa Komitato intencas aranĝi plurajn ekskursojn dum la kongreso. Dum la restado en Bern vi povos ne nur partopreni en la kongreso mem, sed ankaŭ fari ekskursojn, kiuj estos neforgeseblaj kaj ĝuplenaj. La ekskursoj ampleksas grandan parton de la belega Svislando, kaj ni montros al vi la plej belajn regionojn.

Unue vi kompreneble devos vidi la admirindan, malnovan urbon Bern, kiu estas unu el la plej belaj urboj en Eŭropo. Laŭ la aspekto ĝi similas al urbo de mezepoko kun pluraj domoj en gotika kaj baroka stiloj. Ĉiutage ni aranĝos rondveturadojn en komfortaj aŭtobusoj kun lertaj gvidantoj. Tiu interesa veturado daŭros dum du horoj, kaj vi havos agrablan kaj valoran veturadon.

Veturprezo: Fr. 5.— po persono.

Plie vi havos la elblecon ĉiutage partopreni en iu posttagmeza aŭ en iu tuttaga ekskursoj. Jen niaj proponoj al vi:

Posttagmezaj ekskursoj:

1. **Schwarzsee** (Nigra Lago). La veturo kondukas tra la Bernaj antaŭaj Alpoj en la mezon de la sovaĝa regiono de la Bernaj- kaj Fribourgaj Alpoj, inter la lastaj troviĝas la romantika Nigra Lago.
Veturprezo: Fr. 12.— po persono.

2. **Corniche**. Belega veturo trans unu el la plej mirindaj mont-teraso, belega elrigardo, vidaĵo kiu leviĝas pli kaj pli alten al la pintaj Alpoj.
Veturprezo: Fr. 9.— po persono.

2 b. **Niesen-veturado**. Per la fervojo al Mülenen laŭlonge la lago de Thun kaj kun ŝnurfervojo al unu el la plej valoraj elrigard-montoj de la Berna Oberland kun la panoramo de la montegaro de Jungfrau- kaj Blümlisalpggrupoj.
Vojaĝprezo: Fr. 12.— po persono.

3. **Chasseral**. Veturo sur bela monta lago en Jura, tra Taubenloch-abismo kaj sur Chasseral, kun grandioza rondrigardaĵo sur la Svisa Mezlando kaj la Alpoj.
Veturprezo: Fr. 13.— po persono.

4. **Trümmelbach**. Unu el la plej belaj veturoj en la koro de la Berna Oberland al la akvofalo de Staubbach, al la akvofalo de Trümmelbach kaj al la glaciario de Grindelwaldtal.
Veturprezo: Fr. 14.— po persono.

5. **Ekskurso al 3 lagoj**. Ŝatata veturo al la lagoj de Murten kaj Neuchâtel, reveturo tra la historia urbo de Laupen.
Veturprezo: Fr. 9.50 po persono.

6. Ekskurso al Emmen-valo, al la plej konataj, riĉaj vilaĝoj de Emmen-valo kun ĝiaj imponaj kamparandomoj.


Veturprezo: Fr. 10.— po persono.

Tuttagaj ekskursoj:

- 1 a. **Jaun-pasejo.** Tre valora rondveturado de Bern al la Lago de Thun tra la bela Simmen-valo kaj Saanenland trans la Jaun-pasejo en Greyerzerland al Gruyère (vizito al la malnova kastelo) kaj trans Broc (ĉokoladfabriko Cailler) kaj Fribourg (mezepoka urbo) returne al Bern.
Veturprezo: Fr. 15.— po persono.
- 2 a. **Susten-pasejo.** Veturo trans la tute moderne konstruita kaj plej bela pasejo inter la Berna Oberland kaj la Kantono de Uri, kun reveturo tra Luzern laŭlonge la Kvarkantona Lago.
Veturprezo: Fr. 28.— po persono.
- 3 a. **Ekskurso tra urboj kaj vilaĝoj.** Veturo tra belaj malnovaj urboj de la Berna Mezlando kun konduko tra Fribourg, Payerne, Murten, Estavayer, Yverden kaj Neuchâtel.
Veturprezo: Fr. 18.— po persono.
- 3 b. **Jungfrauĵoch.** Per fervojo en la valo de Lauterbrunnen, kun la Wengernalp-fervojo al la Malgranda Scheidegg kaj kun la plej alta fervojo en Eŭropo al la alteco de 3456 m., en la mezon de la grandioza glaciario kaj de la gigantaj montoj.
Vojaĝprezo: Fr. 45.— po persono.
- 4 a. **Col de Pillon.** Tre bela veturo tra la montara regiono de Simme kaj Saanenland, kaj trans Col de Pillon (Pillon-pasejo) al Montreux ĉe la bela lago de Genève.
Veturprezo: Fr. 20.— po persono.
- 5 a. **Granda Jura-veturado.** Tra Biel kaj la romantika sovaĝa Pierre-Pertuis al la granda horloĝfarista vilaĝo en Jura kaj al la impona kruta kluso de Saut du Doubs. Reveturo tra Vue de Alpoj kaj Neuchâtel.
Veturprezo: Fr. 17.— po persono.
- 6 a. **Granda transalpa veturado.** Unika veturo laŭlonge la lagoj de Thun kaj Brienz, trans Grimsel-pasejo al Rhône-glaciario, trans Furka-pasejon al Schöllenen-kluso kaj laŭlonge la Kvarkantona Lago, returne tra Luzern.
Veturprezo: Fr. 30.— po persono.

En tiuj ekskursoj vi sentos vin hejme inter nur esperantistoj. Car la kongreso okazos dum la plej vigla turist-sezono, ni estos devigataj antaŭmendi la aŭtobusojn kaj la trajnojn. Ni petas vin, ke vi kiel eble plej frue sendu la mendilon al ni, kaj se eble ankaŭ la monon samtempe. Vi helpas al la Loka Kongresa Komitato, se vi tuj, aŭ almenaŭ plej malfrue la 31-an de Marto 1947, sendos la tutan monsumon. Ni tamen akceptos aliĝilon, se vi povos sendi almenaŭ 25 % de la tuta sumo kune kun la mendilo.

Ni bezonas apartan mendilon por ĉiu kongresano (ricevebla ĉe Sveda Esperanto Federacio).



La Kongresurbo 1947.

Veturo tra Germanujo

Estis al mi granda ĝojo kiam mi ricevis la sciigon de Internacia Esperanto-Ligo, ke mi estas dungita kiel kongresa sekretario. Mia unua penso estis, kiel veturi de Stokholmo al Berno. Demandinte ĉe turista oficejo, mi ricevis la sciigon ke estas ebleco veturi aŭ per flugmaŝino aŭ per trajno (tra Germanujo kaj Francujo). Estis ankaŭ la tria solvo, nome aŭtobus-veturo. Mi elektis la lastan, ĉar tiel mi povus vidi iom de la nuna Germanujo.

Sed antaŭ mia ekveturo al Svislando, mi deziris fari longan bicikladon. Unue mi veturis al Bergen por partopreni en la jarkunveno de Norvega Esperantista Ligo dum Pentekosto. Post tio mi biciklis de Bergen tra Oslo al Stokholmo kaj de tiu urbo al Kopenhago. La vetero estis tre bela dum la tuta tempo. Post iom da rondbiciklado en Danlando, mi veturis al Göteborg, kaj de tie mi daŭrigis la bicikladon al Oslo.

Post vizito al Norda Norvegujo, mi veturis al Stokholmo, kie mi devis atendi dum longa tempo, ĝis mi ricevis la loĝ- kaj laborpermeson en Svislando. Sed turistan vizon oni povas ricevi tre facile. Ankaŭ travetur-permeson tra Germanujo oni ricevas facile post mallonga tempo de la Brita Legacio.

La aŭtobuso ekveturis de Hälsingborg en Svedlando kaj traveturis Danlandon kaj Germanujon al Basel en Svislando.

La veturo estis tre interesa kaj ne tiel laciga kiel oni ordinare kredas. La veturo daŭris dum 3 tagoj. La unuan nokton ni bone dormis en hotelo en Kolding (Danlando). Proksiman matenon ni ekveturis je la 8-a kaj veturis dum la tuta tago, nokto kaj sekvanta tago. Dum la nokto mi dormis sufiĉe bone sidante en la aŭtobuso. Survoje ni haltis de tempo al tempo en Germanujo por manĝi en restoracioj. Sed la manĝaĵo estis kunportita de la aŭtobus-geservistoj. Estis 2 ŝoforoj kaj 2 servistinoj. Kaj ni estis 35 vojaĝantoj. Sed kelkfoje ni ankaŭ manĝis sidante en la aŭtobuso.

Okfoje ni esits haltigitaj en Germanujo de la okupantaj milit-policistoj por montri nian pasporton. Leteron al aŭ el Germanujo kaj gazeton ne estis permesate kunporti.

En Germanujo ni vidis multege da ruinoj ĉie, precipe en Hamburgo. Kelkloke kuŝis la ruinoj ankoraŭ trans la stratetoj. Malofte oni vidis fenestron kun vitro, kaj en la fenestroj de la butikoj estis nenio, escepte paperaĉo. Sed tamen la vestoj, ŝuoj kaj la aspekto de la homoj ŝajnis esti sufiĉe bonaj. (Verŝajne pro tio, ke dum la okupado de la aliaj landoj, la germanoj forŝtelis grandan provizon de ili.)

Sed kiel la germanoj pendis, plendegis pri tiu mizero, kiun ili nun devas trapasi! Kaj ĉiuj diris, ke ili ne estis hitleranoj, kaj ili ne kulpas al la milito.

Krom la ruinoj mi rimarkis la vicojn antaŭ la manĝ-butikoj kaj multe da infanoj ĉie. Ŝajnis al mi, ke multaj homoj loĝas en la keloj sub la ruinoj. Ĉie estis la pontoj kaj viaduktoj rompitaĵ, sed laŭlonge nia vojo ili estis provizore riparitaj.

En la brita kaj usona zono ĉiuj sciigoj kaj strat-

Kristina el Svedujo

de A. Bordiga

Kiam oni faris ŝin reĝino, Kristina estis sesjara infano kun la dubelblondaj haroj ĉiam defalantaj sur la frunton kaj malordaj ankaŭ en la solenaj okazoj, kun grandaj okuloj malhelaj kaj iom necertaj, kun elstara nazo, larĝa mentono kaj du malgrandaj blankaj manetoj belformaj.

Tre vigla kaj moviĝema, ŝi ĉeestis rezignacie la oficialajn ceremoniojn. En mantelo el purpuro kaj ermenfelo kaj kun la scepro kaj la krono iom oblikve staranta sur la distaŭzita kapeto ŝi sekvis la religiajn ceremoniojn apud sia patrino en funebraj vestoj. Ŝi gajiĝis nur dum la militistaj paradoj. Tiam, hur sia blanka ĉevalo, ŝi salutis la trupojn parade marŝantajn antaŭ ŝi kun la plumaro flirtanta kontraŭ la pala norda ĉielo en la trembriloj de la klingoj.

Kiam ŝi estis pliaĝa ŝi forskuis la jugon: ŝi estis laca de la ĉiutaga multhora sidado por subskribi paperojn, aŭskulti enuigajn paroladojn, aŭdi edziĝajn proponojn, kiujn ŝi ĉiam forjetis. Edzon, kunsortan princon... Neniam!

Ho, kiel neelporteble pezis tiu krono el oro kaj gemoj!... Kaj Kristina abdikis.

La popolo plendis, sed ŝia decido estis firma kaj ŝi mem demetis la kronon, ĝin rigardante kun rideto kaj skuante la blondan longbuklan perukon.

Vizitante la kortegojn de Eŭropo, Kristina alvenis al Romo, atendita de la Pontifiko, post la ekŝigo de sia religio.

En tiu 26 decembro pluvis jam de du tagoj, sed la sekvantaro, kiu devis akompani la reĝinon de Svedujo al la Papo, tamen ordiĝis. Subite la suno, disŝirinte la nubojn, per sia lumo radia ekbruligis Romon kvazaŭ por honori la fremdulon.

Ĉi tiu virino, kiu rezignis la tronon kaj forĵuris sian kredon, kiu vekis multegajn scivolojn, tie kaŭzis elreĝigon: malbela kaj malbelforma, kun unu ŝultro pli malalta ol la alia, vizaĝo tre bruna kovrita de lanugo, mentono larĝa, granda agla nazo, la voĉo akretona, ŝi aspektis vire!

Sed pro tio ke la popolamaso tre ŝatas spektaklon de grandiozeco kaj la korteganoj kaj la parazitaj esperas honorojn kaj donacojn de la riĉuloj kaj de la potenculoj, la aklamoj daŭris longe kaj la tuta Romo, kliniĝanta kaj admiranta, ĉirkaŭis Kristina. Tamen, post iom da tempo la aero de la Eterna Urbo ŝajnis peza kaj neelportebla al la reĝino. Pli bone vagi la vastan mondon en la bruo de grandnombra sekvantaro, postlasi la ĝenantojn, la cenzuristojn kaj libere ellasi la subitan pasion, kiu tentis ŝin pri ŝia ĉevalestro markizo Rinaldo Monaldeschi, bela atleta viro kun varmega rigardo kaj buŝo voluptema.

Kristina ja ne estis bela, tamen la italo maltrankviligis sub la insistaj rigardoj de la reĝino, de kiu, por respekto, li deturnis siajn okulojn kaj subpremis en sia koro la ekflorantan amon.

Kaprico de reĝino, sindonemo de kortegano.

*

Novembro en Parizo. Ĉielo griza kaj prema, malvarma duonombro en la salono, kie Kristina troviĝas kun tri aŭ kvar nobeloj, foliumante kelkajn paperojn. Kiam Rinaldo Monaldeschi nigrestita estas enironta, haltiga gesto de Kristina rigidigas lin sur la sojlo. Pala li fiksas siajn okulojn sur tiuj de la virino, kvazaŭ por diveni la malluman penson, kiu kaŝiĝas malantaŭ la frunto sulkigita. Glacia frostotremo vibras tra la aĵoj kaj la ĉeestantaj viroj.

Kristina rigardas la markizon kun metaleca lumo en

montriloj estis skribitaj en la angla lingvo kaj en la franca zono france.

Veninte tien ĉi al tiu bela urbo Berno, mi tuj komencis labori ĉe la oficejo de la Loka Kongresa Komitato por prepari la venontjaran kongreson, kiu verŝajne estos tre granda. Bonvenon!

O. T. Nicolaisen.

Vintra vespero

L. Szabò

Alvenis Loci, fil' trijara
kun ventmordita ruĝa vango,
la urson ĵetis li, kaj laŭdis
la mondon lia eta lango,

ke fumas nazo de l' ĉevalo,
ne falis li de la glitilo.
Genuojn miajn eksurrampas
por elrigardi mia filo.

Ho, kial li reveni devis?
Avide brilas la okuloj
vidante kiel ekdancigas
libelojn neĝajn ventoluloj.

Babilas li, mi sentas kiel
koreto pulsas sub la mano,
mi pensas pri kapreolido,
arbaro, lupoj, uragano,

milito, plago, defendmanko,
pri ĉio, kion mi sur stratoj
mem vidis ĵus veninta hejmen.
Pri ĉiuj krudaj sortobatoj,

pri ĉiu vundo de la mondo,
pripensi eĉ pli ol malbone,
ĉar kion ni esprimi povas,
nin igas ĝemi angortone.

— Ho, Paĉjo kiel bela vintro!
La knab' raviĝas kun aplaŭdo.
Ho estus bone al li kredi,
Al ĉi sencia ĝojo, laŭdo.

El la hungara: F. Szilágyi

la pupiloj kaj moka faldado en la anguloj de la dikaj lipoj. Senvorte ŝi prezentas al la italo la paperojn skribitajn. Poste ŝi ordonas al li legi, sed kiam la viro alproksimiĝas ŝi haltigas lin per la mano, turnas sin, faras signon...

Tri murdkomisiitoj tuj eniris kaj forkondukis la markizon perforte. Monaldeschi petegas esti aŭskultata; de ĉe la pordo li alvokas justecon kaj kompaton.

Kristina scias, ke la senpripensaj vortoj sur la papero estas nur blinda frenezo de ĵaluzulo, sed ŝia vizaĝo restas senmova, malindulga, kaj nek la insistoj kaj kortranĉa kriegado de l' mizerulo nek la petoj de la teruritaj ĉeestantoj metas ombbron kaj tremeton sur ŝian maskon el ŝtono.

Post momento oni portis al ŝi malgrandan ponardon kun ora tenilo, kiun ŝi donacis al la markizo, kaj preĝlibreton makulitan de sango. Ŝi rigardis kaj repuŝis ilin per la ekstremaĵo de l' malgranda fingro, ĉirkaŭkollektis sian longan veston el veluro kaj ŝovis la kapon tra la pordo por observi la spektaklon teruran, la konvulsian korpon, la sanglagon dislarĝiĝantan sur la planko kaj diris:

— Tio estis farenda!

Sia voĉo sonis kiel kutime, la rideto de moko en la anguloj de la dika buŝo aspektis kvazaŭ rikano de kontentiĝo...

Tradukis LUIGI FRATESCHI
PISA (Italujo)

Recenzoj

ESPERANTO LÆREBOG, *til Brug i Kursus og ved Selvstudium*, de L. Friis. Eldonis Dansk Esperanto-Forlag. Mendebila pere de Eldona Societo Esperanto, Stockholm. Prezo: 4: — kr.

Tiu fakto, ke ĉi tiu libro nun aperis en sia 6-a eldono, atestas ke ĝin alte taksas kaj ŝatas niaj danaj samideanoj kaj ke ĝi taŭgas por sia celo kaj plenumas sian difinon. Ion plian svedo apenaŭ povas diri pri dana lernolibro. Entute estas tre malfacile recenzi lernolibron, eĉ se oni tre zorge ĝin trastudis. Ne uzinte ĝin en praktiko oni verdire ne kapablas juste prijuĝi tian libron.

I. a. la studantoj, same kiel en nia sveda koresponda kurso, ricevas la taskon traduki la vorton "malinteresa". Mi vetas ke ĉiuj tradukos ĝin per "uinteressant" kaj ke tiu respondo estos akceptita kaj aprobita.

Trafoliuminte la libron tre rapide kaj supraĵe mi plue tamen kuraĝas atentigi pri du-tri punktoj, kiuj ŝajnas al mi korektindaj en nova eldono.

Oni diras ke tio estas egala, ĉu oni diras "multe da" aŭ "multaj", "kelke da" aŭ "kelkaj". Tio tute ne estas ĉiam egala. Vidu en § 32 de la Fundamento kaj en Lingvaj Respondoj!

Parolante pri tiuj prepozicioj, kiuj povas esprimi direkton, kiam sekvas akuzativo, oni elnombras nur 8 el 14.

Pri "kiu" kaj "tiu" estas dirite ke ili signas *nur* personon, kiam ili staras solaj. En la frazoj "Jen estas du bildoj. Kiun vi preferas?" kaj "Rigardu la portretojn! Tiu prezentas la patron kaj ĉi tiu la fraton." la vortoj "kiun" kaj "tiu" *ne* indikas personon, kvankam ili staras solaj.

Nenio estas dirita pri la transitivigo kaj netransitivigo de verboj pere de *ig* kaj *iĝ*, pri la diferenco inter *iĝ*-formo kaj pasiva formo, pri la kazo post kiel, kvazaŭ, krom kaj anstataŭ k. t. p., sed tio eble apartenas al dua parto de la lernolibro. Entute oni bone sukcesis prezenti la lingvon en la 100 paragrafoj.

Grava preseraro en paĝo 35, punkto 3: la ordaj numeraloj finiĝas per a, ne per e.

Bedaŭrinde ke oni ĉiam devas oferi tiel grandan parton de la lernolibroj al instruado de la nacilingva gramatiko. Certe duono de ĉi tiu libro estas dediĉita al klarigoj pri gramatikaj terminoj kaj konceptaĵoj.

Bigo.

LA BATALO DE L'VIVO de *Charles Dickens*, tradukis el germana traduko D-ro L. L. Zamenhof. Eldonis Libroservo Federacio de Laboristaj Esperantistoj, Amsterdamo. Aĉetebla ĉe Eldona Societo Esperanto, Stockholm. Prezo: 3: 50 kr.

Charles Dickens estas tiel fame konata, ke li ne bezonas karakterizon ĉi tie. Mi mem ne legis multon el liaj verkoj kaj mi estis forte frapita de la simileco laŭ stilo kaj esprimmaniero inter ĉi tiu lia rakonto kaj la fabeloj de lia samtempulo, H. C. Andersen. Ĉu povas esti ia spirita parenceco inter

Junularo

Ni atendas.

Komence de nova jaro oni tre volonte faras gravajn decidojn. Nur fortaj, firmaj karakteroj ĉiam povas realigi siajn decidojn. Aliaj lasas ilin post iom da tempo. Ankaŭ inter la esperantistoj oni vidas ekzemplojn, kiuj atestas pri ambaŭ kategorioj. Kial ne? Ni estas ja homoj tute ĝeneralaj, konsistantaj el bono kaj malbono.

Inter la junularo esperantista regas tamen firma volo, kiu sin manifestos dum la jaro nova kaj esperonona. Ni decidis jam daŭrigi nian laboron kaj ankaŭ ĉio plifortigi niajn poziciojn. Tamen ni nek volas nek povas labori kiel grupo izolata. Ni atendas helpon kaj subtenon de ĉiu esperantisto, juna same kiel maljuna. Kaj ni nepre bezonas vian fortan apogon.

Esperanto en la lernejon! Jen signalo, kiun ni jam rekonas tre bone. Sed nun estas la demando: ĉu vi estas pretaj fari vian parton en la praktika, laborolena agado sur tiu grava kampo? Nur kiam la ĝenralistoj esperantistaj — en nia kaj aliaj landoj — kunhelpas kaj fervore dediĉas sian energion al instruado kaj gvidado inter geknaboj en diversaj lernejoj, unularaj societoj kaj speciale kolektotaj grupetoj, ni komune povas atingi bonan rezulton.

Ni certigas vin, ke la kontraŭstaro flanke de la ernejaj aŭtoritatoj ne estas la plej grava malhelpo. Certe oni ankoraŭ ne estas preta enkonduki Esperanton kiel devigan studtemon, sed libervole aranĝota

la aŭtoroj, aŭ ĉu stilo kaj maniero estas tipaj por tiu tempo?

Ĉi tiu libro havas al ni specialan intereson pro tio ke D-ro Zamenhof mem faris la tradukon. En la libro troviĝas faksimilo de letero, en kiu Z. rakontas pri la cirkonstancoj ĉe la fariĝo de ĉi tiu traduko.

En la antaŭparolo al la dua eldono (ĉi tio estas la tria) oni diras koncerne la lingvon ke "la lingva fundamento en la jaro 1891 estis tiu sama kiel la fundamento de la nuna jaro 1910; la verko skribita antaŭ 20 jaroj faras impreson, kvazaŭ ĝi estus ĵus skribita, kaj tio estas la plej bona pruvo ke nia lingvo estas tute konstanta kaj fortika..." Ĉi tiuj vortoj validas ankoraŭ hodiaŭ, 55 jarojn post la unua eldono. Tamen la lingvo ne stagnas, ĝi konstante evoluadas, sed fundamente ĝi ne ŝanĝiĝas. Verdire ekzistas en la libro esprimoj, kiuj — ofte tre bedaŭrinde — nun elmodiĝis.

Koncerne Zamenhofan tradukon recenzanto estas feliĉe liberigita de la cetere necesa sed sendanka tasko prijuĝi la lingvaĵon. Ĉi tie la legantoj devas mem studi, lerni, juĝi.

Estas tre dezirinde, ke ĉiuj verkoj de Zamenhof estu reeldonitaj, presitaj sur bona papero kaj fortike binditaj, tiel ke ili povas elteni tra la longan disfalon en siajn elementojn. Ĉi tiu libro povus esti pli bona en ĉi tiu rilato sed tamen havas grandan avantaĝon super la malnovaj eldonaĵoj. La verkoj de Zamenhof, originaloj aŭ tradukoj, ja estas la ĉefa kaj plej aŭtoritata fonto, el kiu ĉerpi sciojn kaj instigojn rilate la lingvon.

Bedaŭrinda preseraro malbeligas la titolpaĝon: Zamenhoff.

Esperantistoj! Aĉetu, studu, lernu!

Bigo.

Kristina el Svedujo

de A. Bordiga

Kiam oni faris ŝin reĝino, Kristina estis sesjara infano kun la dubelondaj haroj ĉiam defalantaj sur la frunto kaj malordaj ankaŭ en la solenaj okazoj, kun grandaj okuloj malhelaj kaj iom necertaj, kun elstara nazo, larĝa mentono kaj du malgrandaj blankaj manetoj belformaj.

Tre vigla kaj moviĝema, ŝi ĉeestis rezignacie la oficialajn ceremoniojn. En mantelo el purpuro kaj ermenfelo kaj kun la scepro kaj la krono iom oblikve, staranta sur la distaŭzita kapeto ŝi sekvis la religiajn ceremoniojn apud sia patrino en funebraj vestoj. Ŝi gajiĝis nur dum la militistaj paradoj. Tiam, hur sia blanka ĉevalo, ŝi salutis la trupojn parade marŝantajn antaŭ ŝi kun la plumaro flirtanta kontraŭ la pala norda ĉielo en la trembriloj de la klingoj.

Kiam ŝi estis pliaĝa ŝi forskuis la jugon: ŝi estis laca de la ĉiutaga multhora sidado por subskribi paperojn, aŭskulti enuigajn paroladojn, aŭdi edziĝajn proponojn, kiujn ŝi ĉiam forĵetis. Edzon, kunsortan princon... Neniam!

Ho, kiel neelporteble pezis tiu krono el oro kaj gemoj!... Kaj Kristina abdikis.

La popolo plendis, sed ŝia decido estis firma kaj ŝi mem demetis la kronon, ĝin rigardante kun rideto kaj skuante la blondan longbuklan perukon.

Vizitante la kortegojn de Eŭropo, Kristina alvenis al Romo, atendita de la Pontifiko, post la ekŝigo de sia religio.

En tiu 26 decembro pluvis jam de du tagoj, sed la sekvantaro, kiu devis akompani la reĝinon de Svedujo,

unue per la malfacila rekonstruo de la Lingva Komitato kaj Akademio mem — ni rajtas postuli, ke la sinteno de la "publika opinio" de la esperantista popolo estos alia. Jen, ŝajnas al mi, la minimumaj postuloj:

La esperantista gazetaro komuniku al la publiko la informojn de la Akademio. Se la spaco mankas, kelkaj novaĵoj pri ekskursoj kaj amikaj babilvesperoj povas esti mallongigataj.

Ĉar la akademianoj laboras sen honorario kaj estas plejparte neniam riĉuloj, ĉiuj seriozaj eldonistoj decidu, ke ili sendos senpagan ekzempleron de ĉiu nova publikaĵo ne nur al la prezidanto de la Akademio, sed al ĉiuj 18 akademianoj (kiuj tamen havu la rajton pagi la ricevitaĵojn librojn kaj gazetojn, se ili mem konsideras, ke ilia financa stato tion permesas). Sen la disdono de tiuj "studekzempleroj" ĉia serioza laboro restos nur pia espero.

Iu diros, ke la lasta postulo estas troa ŝarĝo de la ekonomio del esperantistaj eldonistoj. Mi scias — laŭ spertoj dum 25-jara laboro en granda eldonejo — ke tio ne valoras. Ili servos kiel reklamo al pli granda disvastiĝo de la koncernaj verkoj. Aliparte, oni povas ŝpari ion, limigante la duoblan sendon de recenzekzempleroj nur al la vere seriozaj gazetoj.

Eble mi devas akcenti, ke mia intereso pri ĉi tiu afero estas sendependa de tio, ke mi nun estas akademiano. Jam pli ol 10 jarojn antaŭ ol mi estis elektata en la Akademion mi kiel redaktoro de "Esperanta Finnlando" zorgis pri tio, ke ĉiuj akademianoj konstante ricevu ĉiun novan numeron de la nomita revuo, kaj publikigis en ĝi la biografion de ĉiuj tiamaj akademianoj. Ankaŭ ĉe la eliro de la finnaj literaturaĵoj en esperanto mi zorgis, kiam mi havis ian influon je tio, ke ili estu donacataj al la akademianoj. Verŝajne kaj bedaŭrinde tio estas unika en la historio de nia movado.

Se la Espero publikigis nenian vivsignon pri la Akademio de post 1935 — kion mi tamen supozas troigo — ne diru, mi skribas tro longe. Permesu al mi transiri al lingva demando, al kiu la antaŭdirita povas esti bona enkonduko.

Dum kaj "dum kiam".

Antaŭ la milito la subskribinto vere dum longa tempo estis en iom malfacila financa situacio, kaj al mi estis neeble aboni kaj aĉetadi. Kiam nun antaŭ mallonga tempo mi sukcesis havigi plurajn verkojn al mi novajn,

Radio

VARJE DAG: 19.00—19.15 Praha, 31,41 m. 23.00—23.15 Praha, 49,92 m. La mallongondaj sendoj el Praha pliriĉiĝos je raportoĵoj ĉiuspecaj. Ĉiunonate ankaŭ informo pri la esperantista vivo en ĈSR. La enhavo de la du sendoj ĉiutagaj estos malsama.

Måndag: 22.10, Warszawa III 49,06 m. Politikaj informoj. Esperanto-sekcio de la Pola Radio, Koszykowa 8, Warszawa.

23.50—24.00 Praha I 470 m. Föredrag, intervjuer, teaterscener, ŝanĝo kaj meddelanden om esperantorörelsen.

Tisdag: 19.50—20.00, Sofia 32,09 m. Nytt från Bulgarien. Radio Sofia, Esperanto-sekcio, SOFIA, Bulgario.

23.50—24.00, Ostrava (Tjeĉkoslovakien) 325 m. Informationer. Brevlåda. — Radiostacio, OSTRAVA, Ĉeĥoslovakio.

Onsdag: 19.30—19.40, Regiona Stacio Ĉeĥoslovaka 280 m. Esperantoprogramo.

Torsdag: 18.55, Bern (Schweiz) 31 m. "Federalismo kaj paco", korta anföranden av dr Edmond Privat.

23.50—24.00, Praha I 470 m. **Se måndag!**

Fredag: 19.50—20.00, Sofia 32,09 m. Se tisdag!

20.45, EAJ 14 (Spanien). Radio Castellón 200 m. Kurs.

21.30—21.45, B.N.R.O. Kortrijk (Belgien) 202 m.

Föredrag. Zender Kortrijk van de B.N.R.O., Rijselstr. 36, KORTRIJK, Belgujo.

23.50—24.00, Ostrava 325 m. **Se tisdag!**

Lördag: 17.30—17.45, Wien (Österrike) 506 m. "Somera kurso de Esperanto." Därefter nyheter på esp.

18.30—18.45(?), 3 SR (Australien) 238 m. Nyheter.

Endast andra lördagen i varje månad.

19.00—19.45(?), PRA 2 (Brasilien). Föredrag om esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, RIO DE JANEIRO, Brazilo.

21.00—21.30, PRI 3 (Brasilien) 49,75 m. Om livet i Brasilien. "Brazila kroniko". Radio Inconfidência, BELO HORIZONTE, Minas Gerias, Brazilo.

mi renkontis en ili esprimojn antaŭe nekonatajn al mi — kelkajn aprobindajn, aliajn ne. Plej malagrabla min frapis la vortkombino "dum kiam". Unue mi kondamnis ĝin kiel "grava eraro", sed post la aŭdo de la opinio de kelkaj defendantoj mi devis mildigi la juĝon je "malbela rompo de bona stilo". Ŝajnas, ke oni enkondukis ĝin pro la teoria kaŭzo, ke sama elemento (dum) ne povas servi kaj kiel prepozicio kaj kiel subjunkcio. Tio estas, se oni rajtas diri "dum du jaroj", oni ne rajtas esprimi sin "dum ŝi parolis". Malfeliĉe por la enkondukiĝoj, la dua frazparto estas citaĵo el la ekzerco de la Fundamento ("dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj"), kie "dum" aperas dufoje en simila frazkonstruo, en la § 17 kaj § 22. Sed la unua? Tia frazkonstruo tute ne estas trovebla en la tekstoj de la Fundamento. Similan ideon oni tie esprimas jene: en la daŭro de du jaroj (§ 25), en la daŭro de kelke da minutoj (§ 40), en la tago, en la nokto (§ 10), en la printempo (§ 39), en somero (§ 34, 38), en ĉiu tago, en kvar tagoj (§ 14), en tiu sama tempo (§ 13), en la unua tempo (§ 27), en la kota vetero (§ 39), en malbona vetero (§ 42), en vintro oni hejtas fornojn (§ 16), en vintro ni veturas per glitveturilo (§ 34). Per tio mi tute ne volas kondamni la uzon de "dum" kiel prepozicio; mi nur konstatas, ke ĝi estas post-fundamenta uzo, sed tamen tre frua kaj antaŭ ĉio Zamenhofa, ekz.: *Apetito venas dum manĝado*. Kontraŭe, la kombino "dum kiam" oni trovas ĉe neniu bona aŭtoro, mi kuraĝas diri, ĝis proksimume 1930. Kaj ŝajnas, ke mi ne eraras, se mi diras, ke la unuan fojon ĝi aperis ne pli frue ol 1930.

Nun ni do konstatu, ke "dum" havas duoblan funkcion, kiel subjunkcio (origina) kaj kiel prepozicio (ankaŭ tre frua), kaj fakte ĝi estas ankaŭ uzata (tria funkcio) kiel prefiksoido. Tio estas neniel escepta aŭ neregula; multaj elementoj de esperanto estas uzataj en pli ol unu funkcio. Aliparte, "dum kiam" estas senutila kaj malbela pleonazo, uzata de neniu el la modelaj stilistoj de esperanto, kaj tial forĵetinda.

Vilho Setälä.

SEF Kolono

Junularo TJO

PETITIONEN TILL F.N.

Sverige har hittills bidragit med 15.424 (november 1946). Detta är i och för sig en vacker prestation men den räcker tyvärr ej till, om vi skall hävda oss i tävlingen mellan länderna. Holland har redan 37.000, Bulgarien 20.000, England 18.000, Tjeckoslovakien 12.000, Norge 10.000.

Sammanlagda summan av hittills inkomna namn är 179.416. Då IEL anser att denna kvantitet är alltför liten för att imponera på de höga herrarna i Förenta Nationerna, måste sålunda slutspurten intensifieras så att den eftersträvade summan av minst en halv miljon namn uppnås innan kampanjen avslutas.

Sätt därför igång med nya krafttag och låt oss visa att svenskarna verkligen äro intresserade av att få Esperanto officiellt erkänt av Förenta Nationerna.

AMIKARO DE ESPERANTO.

Redovisa omedelbart alla sålda och osålda 2-kronorskort gällande medlemsskap i Amikaro de Esperanto. Utdelningen av de två stipendierna skall ske i januari.

BERN-KONGREESSEN.

Anmälningsblanketter och beställningsedlar för hotellrum kan rekvideras hos S. E. F:s sekretariat.

Reskostnaden till Schweiz kan ännu inte bestämt fixeras, men RESO har meddelat, att priset i 3:e klass tåg blir omkring 200 kr tur och retur Malmö—Bern. I februari-numret hoppas vi kunna komma med exakta priser.

UPPMANA SCOUT-BEKANTA

att uppmärksamma S. E. F:s erbjudande om gratis resa för 2 svenska esperantotalande scouter till scoutjamboréen i Frankrike stundande sommar. Enda villkoret är att delta i S. E. F:s 2-kronors korrespondenskurs. Postgirokonton 2012.

BREVSKOLANS KORRESPONDENSKURS.

Under januari beräknas Brevskolans nya korrespondenskurs i Esperanto utkomma. Priset blir 20 kr för enskild studerande och 9 kr för deltagare i studiecirkel. Beställningar mottas även genom S. E. F.

SVENSKA ESPERANTO TIDNINGEN.

De föreningar som prenumerera kollektivt på vår tidning bör sända in prenumerationsavgiften redan i januari. Detta dels för att medlemmarna skall få tidningen från första numret, dels och icke minst för att expeditionen skall underlättas på förlaget.

A. B. F:s STUDIELEDARKURS.

A. B. F. ordnar på Brunnsviks folkhögskola under tiden 8—20 juni en studieledarkurs för lärare och studiecirkelledare. Kursledare blir Einar Dahl, vilket borgar för att kursen blir intressant och givande. Dessutom kommer även andra föreläsare att medverka. Kostnaden för kursen blir 90 kr, för vilken summa deltagarna får fri resa tur och retur hemorten—Brunnsvik samt uppehälle och undervisning under kurstiden. A. B. F:s lokalavdelningar torde i vissa fall ha tillfälle att ge stipendier.

Ansökningar om deltagande insändas före den 1 mars till A. B. F:s Centralbyrå, Linnégatan 37, Stockholm, och böra åtföljas av rekommendation från A. B. F:s lokalavdelning.

Önskvärt är att esperantoklubbarna på platser, där det finns lokalavdelning av A. B. F. sätter sig i förbindelse med denna och undersöker eventuella möjligheter att ordna deltagande för lämpliga personer. Fackliga förbund, fackföreningar och andra organisationer lämna i regel stipendier till liknande studieledarkurser, och dessa möjligheter bör utnyttjas genom A. B. F.-avdelningarnas medverkan. Dessutom böra klubbarna genom egna stipendier och på annat sätt underlätta deltagande för sina kandidater.

Ni atendas.

Komence de nova jaro oni tre volonte faras gravajn decidojn. Nur fortaj, firmaj karakteroj ĉiam povas realigi siajn decidojn. Aliaj lasas ilin post iom da tempo. Ankaŭ inter la esperantistoj oni vidas ekzemplojn, kiuj atestas pri ambaŭ kategorioj. Kial ne? Ni estas ja homoj tute ĝeneralaj, konsistantaj el bono kaj malbono.

Inter la junularo esperantista regas tamen firma volo, kiu sin manifestos dum la jaro nova kaj esperodona. Ni decidis jam daŭrigi nian laboron kaj antaŭ ĉio plifortigi niajn poziciojn. Tamen ni nek volas nek povas labori kiel grupo izola. Ni atendas helpon kaj subtenon de ĉiu esperantisto, juna same kiel maljuna. Kaj ni nepre bezonas vian fortan apogon.

Esperanto en la lernejon! Jen signalo, kiun ni jam rekonas tre bone. Sed nun estas la demando: ĉu vi estas pretaj fari vian parton en la praktika, laboroplena agado sur tiu grava kampo? Nur kiam la geinstruistoj esperantistaj — en nia kaj aliaj landoj — kunhelpos kaj fervore dediĉas sian energion al instruado kaj gvidado inter geknaboj en diversaj lernejoj, junularaj societoj kaj speciale kolektotaj grupetoj, ni komune povas atingi bonan rezulton.

Ni certigas vin, ke la kontraŭstaro flanke de la lernejoj aŭtoritatoj ne estas la plej grava malhelpo. Certe oni ankoraŭ ne estas preta enkonduki Esperanton kiel devigan studtemon, sed libervole aranĝota kurso ĉiam estas ebla. En kelkaj lokoj oni prosperte eĉ estos tiom favora, ke oni donas subtenon ekonomian por lernolibroj kaj disponigas lernejoĉambron por kurso. Cetere en nia lando SEF subtenas la kurslaboron, faciligante la aĉetadon de lernolibroj, ŝlosiloj kaj kajeroj.

Sed... karaj geinstruistoj! Bedaŭrinde vi ankoraŭ ne povas kalkuli je salajro por via laboro. Ni scias, ke multaj estos pretaj tuj eklabori, kiam rekompenco ekonomia estas certigata. Tion ni ankaŭ atingos! Sed unue vi kiel pioniroj antaŭiru, montrante la vojon.

Kiam nia afero estos potence forta, kiam la gejunuloj grandskale kaj aktive uzas Esperanton — korespondas, legas literaturon, aŭskultas radion, vojaĝas eksterlanden al kongresoj kaj somerkursoj — nur tiam la tempo estas matura por ke ni postulu honorariojn por niaj lecionoj. Do! Unue ni montru rezulton pozitivan. Post ne longe ni havos eĉ monsubtenon de la aŭtoritatoj mem.

Ĉu vi, geinstruistoj profesiaj, kaj ankaŭ neprofesiaj, lertaj kursgvidantoj, nun volas helpi nin, akceptante senkondiĉe postenon kiel libervola instruisto? En 1947? Jam nun, printempe, ni petas vian sinceran idealismon, kiun vi povas montri, donacante malavare iom da libertempo kaj energio por interesa, freŝiga, juniga laboro inter la junularo. Ĉu vi helpas nin?

Ni atendas...

Junul'

La juna vivo,

monata organo de Tutmonda junular-organizo, nov. 1946, enhavas i. a. plenan raporton pri la konferenco en Blankenberge, Belgio, kaj la projekton de la regularo de TJO, kiu estas elsendata por referendumo inter la membroj. La balotiloj estu sendataj antaŭ jan. 1947 al F. Meydam, Owensstraat 59, Leerdam, Nederlando.

Sveda junularkunveno

okazos en la somerhejmo de Jursla, apud Norrköping, la 12—15 de julio 1947. La junularklubo en Jursla aranĝos la kunvenon. Oni promesas bonan programon kaj entuziasme laboras.

LA SVED-ANGLA LINGVO.

Ĉiu svedo studas la anglan lingvon — almenaŭ ĉiu dua — kun la rezulto, ke kelkaj svedoj povas legi ĝin (prefere ne laŭte), kelkaj ankaŭ povas kompreni ĝin, sed multaj ankaŭ kredas, ke ili povas ĉiel uzi ĝin kaj buŝe kaj skribe.

Sed subite eksplodas lertulo kaj forŝiras la vualon de ĝentileco dirante la akran veron.

Estas la sved-naskita profesoro en angla lingvo ĉe Yale university, USA, Helge Kökeritz, kiu faras sensacian atakon kontraŭ la svedaj reklambroŝuroj, certaj sciencaj verkoj ktp, tradukitaj de svedoj por anglelingvaj landoj.

S-ro Kökeritz diras, ke ekzistas apenaŭ unu oficiala sveda enciklopedio aŭ broŝuro en angla lingvo, kontraŭ kies lingvoformo oni ne povas direkti seriozajn rimarkojn. Multfoje la traduko estas tia, ke oni demandas sin, kia la persono povas esti, kiu produktis ion tian.

Sed nia oficiala angla lingvo estas ne nur skriba, ĝi ankaŭ estas buŝa, kaj ankaŭ tio estas kritikinda. Svedoj, kiu ne povas kontentige elparoli unu solan anglan vorton travojaĝas la tutan Usonon kiel svedaj kulturrepresentantoj prelegante "angle"!!

INTERNACIA SOMERKURSO EN SKÖVDE.

Jam nun ni povas sciigi al niaj legantoj en- kaj eksterlande, ke la gajaj, laboremaj esperantistoj en Skövde aranĝos internacian somerkurson dum la semajno 6—12 julio 1947.

La kurso okazos sub aŭspicioj de Sveda Esperanto-Instituto. Interesan kaj valoran programon ni publikigos poste. Jam nun ni povas mencii, ke la klubo esperantista en Skövde disponos trietaĝan domon kun kursejo, manĝejo kaj loĝejo — ĉio nova kaj moderna.

RED. HARALD THILANDER GAJNIS PAC-PREMION.

La Stockholma Pacasocio (Stockholms Fredsförening) decidis transdoni la premion por la jaro 1946 el la fondaĵo de Josefina Larsson al redaktoro Harald Thilander pro lia unika pionira laboro inter la blinduloj de la tuta mondo, kiujn li pere de Esperanto unuigis al komuna kleriga laboro. La sumo de la mondlingva premio en 1946 estis 812 kr. La svedaj esperantistoj opinias, ke pli indan reprezentanton por la mondlingvaj penadoj la Pacasocio ne povis elekti, kaj ni sincere gratulas la gajninton!



DEKUNUA BRAZILA KONGRESO

okazos 13—21 de septembro 1947 en Sao Paŭlo. La organiza komitato jam ekagis.

SONBENDA APARATARO POR NI.

El Ĉeĥoslovakio nin atingas la informo, ke la radiostacio ĉe gravaj okazoj esperantistaj en la nomita lando disponigos al esperantaj raportantoj-priskribantoj aŭtan veturilon kun la tuta aparataro por ke oni povu surbendigi esperantan raporton pri la okazantaĵoj. Oni ĉe tiaj kazoj veturos en la lokon mem, kie la evento okazos, kaj poste la radioaŭskultantoj esperantistaj havos fidelan sonbildon pri la pasintaĵo. — Jen imitindaĵo por la sveda radio!

SOKOL,

esperantlingve Falko, ĉeĥoslovaka gimnastaro, jam preparas diligente la XI-an Universalan Sokolan Feston, kiu okazos en la jaro 1948. Pli multe ol 120 000 sokolaj lernantoj el la tuta Respubliko ekzercos en Praha. Sokola gejunularo (80 000) ekzercos dum 3 tagoj, plenaĝaj sokolaj anoj (95 000) dum 4 tagoj. Krom tio la ĉeĥoslovaka armeo sin prezentos memstare. Ĉiuj ĉeĥoslovakaj gimnastaj organizacioj jam promesis partoprenon. Ankaŭ eksterlandaj gimnastoj ĉeestos la XI-an Universalan Sokolan Feston en Praha en 1948. Ĝis nun venis aliĝoj el Rusujo, Jugoslavio, Bulgarujo, Polujo, Francujo, Svisujo, Nederlando kaj Ameriko.

SUR POLA MARBORDO.

En Gdansk 8-an de septembro okazis unua postmilita kunveno de esperantistoj, laŭ iniciato de ne longe antaŭe veninta el la koncentrejo tra Svedujo fervora kaj agema esperantistino S-ino Edvarda Kaminska. La kunvenon partoprenis kelkdeko da esperantistoj, kiuj unuavice per kelminuta silentado honoris la memoron de tiu-ĉi granda nombro da polaj samideanoj murditaj de germana buĉistaro. Post tre interesa prelego de Samideano Kaminski, oni decidis fondi filion de tutpollanda asocio. Nove elektita estraro konsistas el jenaj personoj: A. Kosuch (prez.), Kaminska (sekret.), K. Majorikiewicz (vicprez.), Toczyski (propag.). La kunveno estis antaŭe anoncita en la radio de Gdansk. Krom tio ankaŭ estis mallonga mencio pri esperanto en sama radio.

Membroj de la nova asocio, plendis multe pro manko de libroj kaj diversaj instruiloj en esperanto. Kaŭzo bone konata: germana okupado tute nenigis niajn asociajn kaj privatajn librorojn. Kiel bone estus, se eksterlandaj esperantistoj, kiuj eble ne tiom suferis dum tiu-ĉi milito, kaj kiuj posedas superflajn, aŭ malnovajn esperantaĵojn, sendus ilin al ni. Ni estus ege dankemaj.

Portempa adreso de la nova filio estas: A. Kosuch-Gdansk Oliva Asnyka NR. 2. Polujo.

En Gdynia en Liceo de Belaj Artoj oni komencis instruadon de esperanto kiel devigan instruobjekton. Lernantoj de tiu-ĉi instituto petas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri belaj artoj, aŭ studentaj ankaŭ ĉi-tiun branĉon de artismo, ke ili skribu al la liceo por interŝanĝado de desegnaĵoj, fotoj kaj aliaj interesaj objektoj. Ankaŭ estus dezirinde sendi al la direkcio de la lernejo gratulleterojn, pro la enkonduko de esperanto. Adreso de la lernejo estas: Gdynia Korzeniowkiego 23 Miejskie Liceu Sztuk Platstycznych.

En la plej granda ĵurnalo ĉiutaga de la marbordo Dziennik Bałtycki aperis interesa artikolo pri esperanto de S-ro Janicki.

Prof. J. Toczyski.

Premia Konkurso

Inter tiuj, kiuj antaŭ la 25-a de Januaro 1947 per letero atentigis nin pri minimume 5 preseraroj aŭ lingve eraraj aŭ dubaj esprimoj el la januara numero de La Espero ni dislotos libron. Sendu la leteron al Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Kåringberget.

Ni volas korespondi kun vi

Francujo.

Svedoj korespondu kun francoj. — Sendu vian korespondpeton al la redaktisto de "Kompreni": Pierre Deahan, 19, Rue de Marseille, Lyon 7. Promesas respondi alm. unufoje.

Nia rondo familia

Naskiĝis.

22.9.1946 filo Paŭlo al gesroj A. Blasimme, Roma.

17.11.1946 filino Carla al gesroj Elda kaj Elio Migliorino, Roma.

Gesinjoroj Karin kaj Gunnar Skagerstrand, Karlskoga, sciigas siajn amikojn pri la naskiĝo de filineto la 29-an de decembro 1946.

Gefianĉiĝis.

Sune Ahlm—Brita Holgers, Stockholm la 21.12.1946.

TRO MALFRUA INFORMO.

Ni ricevis informon, ke la Dana radio faros reportaĵon en la dana lingvo kaj en esperanto ĉe kurso por progresintoj la 8-an de januaro 1947 je 2040h—2100h MET. Bedaŭrinde vi legas tion tro malfrue por povi aŭskulti la dissendon.

FILATELISTER!

Genom medlemskap i I. A. P. K. (Internationella Frimärkssamlarföreningen) får Ni de bästa bytesmöjligheterna. Helt nytt bytessystem. Årsavgift inkl. tidning 5.00 kr. Ungdom under 18 år 2.50 kr. Alla upplysningar genom Sveriges generalagent Bertil Zell, Box 5085, Göteborg 5. Postgiro 240921.

LITERATURA MONDO.

Se vi interesigas pri abono de la denove aperonta Literatura Mondo, petu la nun alvenintan prospektnumeron. Vi ricevos ĝin senpage de Förlagsföreningen Esperanto, Fack 19071, Stockholm 19.

Svenska Esperanto-Tidningen**La Espero**

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Redaktör: Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Käringsberget. Tel. Göteborg 29 03 81.

Prenumerationspris: helt år kr. 4:— . Lösnummer 0:40. Utkommer en gång i månaden.

Annonpris: 20 öre pr mm. Korrespondensannonser: 1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Box 190 71, Stockholm 19. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., post-adress: Box 19071, Stockholm 19 (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 50 88 05.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o. s. v.)

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7:50 kr. pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år. Förening med kollektiv prenumeration å tidningen för sina medlemmar erlägger för varje medlem en årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är årsavgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem 2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL (Sveda Teritorio): Ĉefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Stockholm 32. Postĉeka konto 15 12 88. Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:50; Membro-Abonanto 9:—; Membro-Subtenanto 18:—; Patrono 90:—.

Redigeringen av nummer 2, avslutas den 25. 1. 1947**Oms**

försvinner som bekant fr. o. m. 1 januari 1947. Det blir alltså billigare att köpa böcker och vi hoppas detta skall stimulera våra kunder till flitigare rekvisitioner än hittills.

OBS! Om snabb leverans av beställda böcker önskas, måste förskottslikvid insändas antingen per postgiro 578 eller i frimärken. Glöm ej då att för order understigande 10 kr. bifoga 10 % av beställningssumman för porto.

OBS! Fortfarande kommer massor av post adresserade till Box 698. Detta boxnummer tillhör sedan två år Norska Legationen och be vi därför våra ärade kunder godhetsfullt använda nu gällande adress

Fack 19071, Stockholm 19.

ATENTON! Ni volas atentigi alilandajn gazeteks-pedantojn, ke la adreso de Svenska Esperanto-Tidningen estas tiu de Eldona Societo Esperanto, ĉi-supre notita. La malnova adreso Box 698 apartenas al tute alia firmo de post 2 jaroj.

ATENTON! La revendistoj de niaj eldonaĵoj estas petataj atenti, ke de post la 1.1.1947 la antaŭe al la fakturosumo aldonita IMPOSTO (5 %) ne plu estos aldonata, ĉar la registaro nun finfine decidis ke ĝi malaperu. Tio signifas, ke niaj libroj fariĝos almenaŭ iom pli malmultekostaj ol ĝis nun kaj tial certe allogos pli da aĉetontoj. Nova prezaro espereble aperos en februaro.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Specialerbjudande!

Var och en som under januari månad insänder här nedan befintlig premiekupong samt 25 öre för porto och expeditionskostnader pr bok får nedanstående böcker

G R A T I S

NORDA LITERATURO
PER KIO NI AMUZU NIN
BOVENS BRAVAD
BARBRO KAJ ERIKO
LA KONSCIENCO RİPROĈAS
LINGVA KVARONHORO
ESPERANTA LEGOLIBRETO
HUR LEDER MAN FORTSÄTTNINGSKURSER
SONOJ KAJ VORTOJ DE ESPERANTO
DIALOGOJ KAJ KOMEDIETOJ
BENGALAJ FABELOJ
LA ESPERANTOKLUBO
KAJ ĈIO RESTAS PENSO SED NE FARO

Likvid skall insändas med beställningen — gärna i frimärken.

Observera! Detta erbjudande gäller endast under januari. Passa därför på detta unika tillfälle och sänd rekvisitionen redan idag till

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 19071 - Stockholm 19 - Postgiro 578

PREMIEKUPONG
Januari 1947



Prenumerera på utländska tidningar 1947.

American Esperantist	Kr. 6.—
Argentina Esperantisto	... 2.50
The British Esperantist 2.50
Dansk Esperantoblad 3.—
Esperantobladet (Norge)	... 3.—
Franca Esperantisto 3.—
HEROLDO 9.—
Internacia Kulturo 9.—
LA PRAKTIKO	8.25
Svisa Espero	.. 3.—
La Verda Flamo	4.50

Förlagsföreningen
ESPERANTO
 Postgiro 578
 Stockholm 19

IEL-stjärnan

den internationella esperantorörelsens (**Internacia Esperantista Ligo**) igenkänningstecken, får bäras av varje esperantist, som är medlem av någon av Svenska Esperantoförbundets klubbar eller är direkt ansluten som medlem till IEL.

Femuddig grön stjärna med inskription IEL.
 Pris 1:25 plus 10 öre för porto.
 (Obs. förskottslikvid.)

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
 Fack 19071, Stockholm 19. Postgiro 578

ĈU VI ANKORAŬ NE LEGIS?

D-RO DORNER

Originalo en Esperanto de
Dro H. L. EGERRUP

La Kopenhaga "Ekstrabladet" skribas:

"La artefarita gravedigo hodiaŭ estas realo, kiun la medicina scienco prikalkulas, kaj el kiu ĝi multon atendas."

La aŭtoro, kuracisto kaj krome esperantisto de post multaj jaroj, per sia romano kreis belan kadron ĉirkaŭ la science interesa sed ĝenerale iom delikata temo.

Prezo kr. 6:50+10 % por afranko.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
 Fack 19071, Stockholm 19. Postgiro 578

YTONG

är det idealiska väggmaterialet för bostadshus och industribyggnader. Tack vare den stora isoleringsförmågan ger den fuktfria och sunda bostäder. Undvik trähusets brandrisk och höga underhållskostnader. Bygg i bättre klass genom att använda Ytong.

Bygg för framtiden ett högisolerande stenhus till samma eller lägre pris än ett trähus.

YXHULTS STENHUGGERI A.B.
Hällabrottet